Carl Riedel,

# Venu, paŝtistoj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Venu, paŝtistoj,
Vi homoj al ni!
Venu kaj vidu
La filon de Di'!
Kristo hodiaŭ
Por vi naskiĝis,
Via Savanto
Li elektiĝis.
|: Ne timu vi! :|

Venu rigardi
Vi tion kun ni,
Kion promesis
Ĉiel-melodi'!
Kion vi trovos.
Ni diskonigu,
Kaj la Sinjoron
Ni honorigu!
|: Haleluja! :|

. . .

Carl Riedel,

# Aŭdu, paŝtistoj

*tradukita de Albrecht Kronenberger*

Aŭdu, paŝtisto,
mi diras al vi
Bonan sciigon
pri l' Filo de Di':
Enkarniĝinta,
ĵus naskiĝinta,
Ĉirkaŭvindita,
entrogigita.
Gloron al Li!

Vidu, homidoj,
la amon de Di'.
Malsupreniris
la Vorto por vi.
Kruce murdota,
entombigota,
Resurektonta,
ĉiel-ironta.
Gloron al Li!

. . .

Carl Riedel,

# Come, all ye shepherds

*tradukita de Mari Ruef Hofer*

Come hark unto me!
Go ye to Bethlehem,
Jesus to see!
Great is the story,
Great is His glory,
Great is the story,
Great is His glory,
Be not afraid!

Let us obey now
The heavenly voice!
Jesus, our Saviour's born.
Come and rejoice!
Come every nation,
Give adoration,
Come every nation,
Give adoration,
Gifts to Him present!

. . .

Estas ĝojego
Por la paŝtistar',
La sciigaĵo
De la anĝelar':
Inter la homoj
Nun iĝu paco
Kaj sur la tero
La Dia graco.
|: Al Di' honor! :|

*Traduko de la Germana poemo "Kommet, ihr Hirten" de* CARL RIEDEL *(∗1827-10.05 – †1888-06-03) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1982.*

*MR-014-3 / Arg-565-1140 (2010-09-20 10:01:32)*

*La muziknotojn vidu jen:* `http://www.lieder-archiv.de/lieder/show_song.php?ix=200038`.

Venu, kristanoj,
rapidu al Li,
Kiu bebiĝis
en stalo por vi.
Miru ĝojante,
kore kantante,
Genufleksante,
Lin adorante.
Gloron al Li!

*Traduko de la Germana poemo "Kommet, ihr Hirten" de* CARL RIEDEL *(∗1827-10.05 – †1888-06-03) en Esperanton de* ALBRECHT KRONENBERGER *(∗1940-01-21) en 1990.*

*Arg-565-1142 (2010-09-20 11:11:28)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en la retejo* `http://reocities.com/cigneto/thctxt/a/auxdupasx1.html`.

Truly the angels
Have spoken today:
See Mary, Jesus,
The stable, the hay!
Hear their sweet singing,
Round us now ringing,
Hear their sweet singing,
Round us now ringing,
Glory on high!

*Traduko de la Germana poemo "Kommet, ihr Hirten" de* CARL RIEDEL *(∗1827-10.05 – †1888-06-03) en la Anglan de* MARI RUEF HOFER *(∗1858 – †1929) en 1912.*

*Arg-565-1141 (2010-09-20 10:58:33)*

*Tiun ĉi angligon de la kanto mi, Manfred Retzlaff, trovis en* `http://ingeb.org/spiritua/kommetih.html` *kaj en* `http://www.cyberhymnal.org/htm/c/o/comeayes.htm`. *Informoj pri la tradukinto, s-ino Hofer, Mari Ruef, troviĝas en* `http://www.hymntime.com/tch/bio/h/o/f/hofer_mr.htm` *kaj en* `http://openlibrary.org/authors/OL2440634A/Mari_Ruef_Hofer`.